

# La granda futbalthonto de Ruslando de la jaro 2016

## Rusaj huliganoj dum la Eŭropa Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco de 2016 en Francio

Kiam en februaro 2016 la angla gazeto *Sun* skribis, ke rusaj batalantoj preparas sin por la „milito kontraŭ anglaj piedpilk-fanoj“, tio ŝajnis esti ridinda fantaziaĵo, kvankam la danĝero de perforto ĉirkaŭ futbalo en orienta Eŭropo estis konata jam de longe. Fakte, jam antaŭ kvar jaroj rusaj huliganoj miskondutis dum la Eŭropa Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco en Pollando kaj Ukrainio, tiel ke la organizantoj devis apliki punon kontraŭ la rusia piedpilkasocio. En 2012 rusaj huliganoj atakis en la stadiono de Vroclavo sekurecajn fortojn dum la matĉo inter Rusio kaj Ĉeĥio. Do, la malbelaj eksceso de militemaj rusaj huliganoj kontraŭ anglaj fanoj dum la Eŭropa Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco en Francio en junio 2016 montris, ke *Sun* ne troigis. La averto estis prava. Sed kio fakte okazis ĉi-jare en Francio?

La 11an de junio 2016, je la fino de la ludo inter angloj kaj rusoj, ankoraŭ en la stadiono rusaj agresuloj elsaltis el la propra fanbloko kaj komencis furiozan atakon kontraŭ anglaj fanoj, post kiam piroteknikaĵoj estis ĵetitaj, kiujn la fanoj sukcesis kaŝe kunporti en la stadionon. La stadiona parolisto insiste sed vane alvokis la fanojn rezigni pri kaoso kaj perforto, tamen, feliĉe, paniko kun gravaj sekvoj ne okazis. Inter la atakantoj okulfrapis alta viro kun blua ĉapelo, kiu restas en la memoro kvazaŭ kiel simbolo de la organizita operaco de tiuj rusaj fan-huliganoj; lin oni povis vidi ankaŭ en la tumultoj sur la stratoj de Marsejlo, kiuj estis lanĉitaj ĉefe de anglaj kaj francaj huliganoj, kie unu anglo grave vundiĝis, kaj en kiuj finfine ankaŭ rusaj batalantoj enmiksiĝis, kiuj flugis la 10an de junio de Moskvo al Marsejlo.

Kiel ŝtormo sur la stratoj de Marsejlo aperis grupo de ĉirkaŭ 150-200 rusaj atakantoj de ĉiuj flankoj por ĉasadi la anglojn. Antaŭ ol ataki la amason surstrate, la rusaj batalantoj ŝajne atendis en iu irlanda trinkejo, kiu estis plena de angloj. Post plenumita laboro la rusaj vandaloj malaperis same fulmrapide kiel ili aperis. Rusa fano, kiu priskribis por la gazeto *Komsomol'skaja pravda* la eventojn de la 9-10aj de junio, uzis la vorton „pogromo“. Anglaj atestantoj-viktimoj kiel Martin Lowe kaj Richard Wakefield, kiuj estis batitaj kaj priŝtelitaj de rusoj, rakontis la detalojn de la atako de rusaj huliganoj, La marsejlaj tumultoj kaŭzis 35 vund-itojn, ĉefe anglojn. Bildojn kaj filmojn oni povas trovi en la gazetartikoloj, kies retadreso estas indikitaj sube.

La franca historiisto Sébastien Louis, kiu estas fakulo pri huliganado, kaj kiu ĉeestis la marsejlajn surstratajn ekscesojn kiel observanto, parolis pri la rusaj huliganoj kiel „kvazaŭ-armea komando“. Mark Roberts, alia eksperto sur tiu ĉi kampo kaj policisto, kiu same observis tiujn batalojn, perplekse konstatis, ke la rusoj estis bonege organizitaj kaj profesie ekipitaj kaj agis per nekutima brutaleco, kiu diferencigas de tiu de ´simplaj´ huliganoj. Oni konstatis, ke la rusoj estis ekipitaj per buŝŝirmiloj (por protekti la dentojn), batalgantoj kaj teleskopaj batiloj, kiuj estas uzataj de la polico. En multaj landoj tiaj bataliloj estas konsiderataj kiel armiloj kaj laŭ la leĝo traktataj kiel tiaj, do ilia apliko fare de nerajtigataj personoj estas parte malpermesata.

Sed kiuj estis tiuj rusoj kaj kiuj estas iliaj motivoj? Laŭ gazetaraj komunikoj temis pri anoj de rivalantaj kluboj el Ruslando, kiuj kolektiĝis ĉi-foje ne por batali unuj kontraŭ aliaj inter si mem kiel kutime, sed por kune ataki aliajn, en ĉi tiu kazo precipe anglojn, kun kiuj la rusoj evidente havis malnovan fakturon por egaligi. Laŭ eldiro de rusa fano, inter la rusaj huliganoj estis reprezentitaj la kluboj Spartak, Lokomotivo kaj Dinamo el Moskvo kaj Zenito el Sankt-Peterburgo. Laŭ tiu anonima rusa inform-anto, ĉefa celobjekto de tiuj rusaj batalantoj ne estas nur piedpilk-fanoj de aliaj landoj, sed ajnaj malamikaj celgrupoj, precipe malhelhaŭtaj kaj aziece aspektantaj homoj, samseksemuloj kaj aliaj malplaĉaj minoritatoj. Do, la rasisma kaj ksenofobia fono estas evidenta kaj la simileco kun novnazioj kaj skinhedoj okulfrapa. La bra-zilano Hulk, kiu piedpilkludas en Sankt-Peter-burgo, diris, ke en ruslandaj stadionoj

rasismaj ekscesoj estas normala fenomeno. Grava averto por la venonta Monda Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco, kiu okazos post du jaroj en Ruslando!

Unu el la rusaj batalantoj fanfaronis ĉe ĵurnalisto de *Sun*: „Ni estas malmolaj viroj, ne kiel tiuj molaj angloj kun T-ĉemizoj de Lacoste, kaj multaj el ni estis ĉe la polico kaj en la armeo.“ Iu „Vladimiro“, kiu estis intervjuita de la televido kaj ne volis esti rekonebla, diris ke li estas kontenta pri la batalo, ĉar tian momenton li atendis dek jarojn. Laŭ lia klarigo, la rusoj volis nur „montri al la angloj, ke ili estas pli fortaj“. Laŭ Vladimiro do ne temas pri interetna malamo, sed pri nura ludo inter viroj, kiuj volas demonstri sian superecon. La intervjuito konfirmis, ke la rusaj batalantoj estis bone trejnitaj laŭ diversaj sportaj disciplinoj kaj emfazis, ke ili ne estis ebriaj.

Fakte, la matĉo inter Anglio kaj Rusio estis klasifikita kiel ludo kun „alta risko“, do oni devis enkalkuli tumultojn kaj perturbojn antaŭ, dum kaj post tiu matĉo. Krom tio, en Francio ekzistis terora danĝero, kaj oni timis atencon kontraŭ la stadiono. Malgraŭ tio, la sekurecaj kontroloj ĉe la enirejo estis tro leĝeraj, kiel unu el la fanoj raportis. Koncerne la surstratajn tumultojn, la franca polico ŝajnis esti surprizita de tiu nekutima potenco flanke de rusaj huliganoj. Jean-Claude Gaudin, urbestro de Marsejlo, konfesis, ke li miris pri tiu altnivela agresema perforto. Do, kritiko al la adreso de la francaj aŭtoritatoj kaj organizantoj estis neevitebla, kaj eĉ aperis seriozaj duboj pri la (mal)-kapablo de la francoj garantii sekurecon. Eĉ ne unu el tiuj sovaĝaj rusaj huliganoj povis esti kaptitaj de la franca polico, kio tamen estas iom stranga. Kial la franca polico ne tuj rigore ĉasadis tiujn rusajn krimulojn? Anstataŭ aresti kaj identigi rusojn, la franca polico trovis ses britojn, unu aŭstron kaj tri francojn, kiuj ankoraŭ samtage estis prezentitaj al tribunalo, kaj severe punitaj. Bernard Cazeneuve, franca ministro pri internaj aferoj, kaj Brice Robin, ŝtata prokuroro, anoncis pli rigorajn rimedojn kontraŭ huliganoj, kio inkluzivas rapidan juĝadon kaj punadon. Intertempe, la francaj piedpilk-organizantoj malpermesis vendon kaj konsumadon de alkoholaĵoj ankaŭ en la proksimeco de la stadiono.

Por tamen prezenti almenaŭ unu sukcesan rezulton por montri, ke Francio regas la em-barasan situacion, francaj ĝendarmoj kontrolis iun hotelon, kie loĝis rusaj fanoj, kiuj devis duone senvestiĝi kaj estis fotitaj. Alian operacon la franca polico lanĉis, haltigante aŭtobuson kun rusaj fanoj, kiuj estis survoje al Lilo. Kaj apud Nico la franca polico arestis 40 rusajn huliganojn. Dudeko da rusaj civitanoj, inter ili *Aleksandro Sprygin*, ĉefo de la rusiaj fanoj, estis petitaj forlasi la landon tuj. Tiu polica operaco kaŭzis lian akran proteston, ĉar li vidis la rajtojn de siaj civitanoj lezita. Eĉ la rusa ministro pri eksterlandaj aferoj, *Sergej Lavrov*, kolere reagis per diplomatia demarŝo. En Moskvo la franca ambasadoro devis viziti la ministerion de la eksterlandaj aferoj, kie la rusoj plendis pri „diskriminacia“ traktado de siaj civitanoj en Francio. El la vidpunkto de la rusia gazetaro, kiu uzis la vorton „deportado“, la rusiaj fanoj fariĝis viktimo de la franca polica arbitro. Tiel, la rusoj provis turni la lancon kaj kulpigi la francojn kaj anglojn pri la incidento kun la rusoj. Tri rusaj partoprenantoj en la tumultoj en Francio estis kondamnitaj de francaj tribunaloj kaj ricevis punon de arestado en malliberejo dum 12-24-monatoj. Sed ĉu la franca polico kaptis kaj punis la ‘ĝustajn’ rusojn, ne estas konate.

Kio koncernas Aleksandron Sprygin, temas pri aparte konsiderinda frukto de la radikala fansubkulturo de Ruslando. Fifama kiel rasisto kaj gvida forto de la novnazioj de Ruslando en la 90aj jaroj, li estis iama protago-nisto de la huliganoj de „Dinamo Moskvo“ kaj en 2007 fariĝis ĉefo de la rusiaj piedpilkfanoj. Kun tia ofico Sprygin havas la statuson de kvazaŭ-oficiala funkciulo, kiu disponas pri protekto de la ŝtato kaj verŝajne eĉ de Putin mem. Kiel Sprygin notis en la sociaj retoj, la „11a de junio estas bonega tago“, kvazaŭ festotago en Ruslando. Ĉu li celis laŭdi la remizon, kiun la rusoj ludis kontraŭ la angloj, aŭ aludi la atakojn de la rusaj huliganoj kontraŭ la anglaj fanoj, ne estas klare. Kvankam Sprygin estis unu el tiuj rusaj fanoj, kiuj estis forigitaj el Francio, li senhonte revenis kun sia „valida ŝengena vizo“ kaj estis denove vidata en alia piedpilkmatĉo, en kiu la rusoj ludis kontraŭ la slovakoj, tiel ke la franca polico devis denove forkonduki lin.

UEFA, la tegmenta organizaĵo de la eŭropa futbalo kaj ĉefa responsulo de la turniro, enkondukis juran esploron kontraŭ la rusia futbolasocio kaj reagis per jena verdikto: Se tiaj tumultoj ripetiĝos, la koncernaj piedpilk-teamoj estos senprokraste ekskluditaj de la turniro. Ricevinte kiel tuto la flavan karton, por la rusa teamo tio signifis, ke ĝi havis ekde nun nur provizoran statuson por partopreni la ludojn. Ĉe la

rusoj la timo esti ekskludita reale ekzistis: La retportalo *gazeta.ru* jam antaŭvidis la scenaron, ke la „agresema konduto de la rusaj fanoj povus kaŭzi katastrofon por la rusa futboleamo, ĉar povus okazi, ke la protektitoj de trejnisto *Leonid Sluckij* devos anticipi forlasi la turniron, malgraŭ la heroo remiso kontraŭ Anglio.“ Ĉiukaze, baldaŭ ĝi devis forlasi la ludojn, tamen pro alia kialo. Krom tio, la piedpilk-asocioj de Anglio kaj Rusio estis kondamnitaj pagi monpunon de 150'000 eŭroj.

Ŝajnas, ke post la matĉo inter angloj kaj rusoj ne plu okazis gravaj huliganaj incidentoj en Francio, se oni pretervidas sensignifajn esceptojn. La 14an de junio ebriaj rusaj huliganoj ankoraŭ atakis slovakojn en Lilo. Kaj kelkajn tagojn poste rusaj huliganoj aperis en Kolonjo, Germanio, kie ili tumultis antaŭ la katedralo kaj atakis hispanajn turistojn. La polico trovis ĉe ili objektojn tipajn por huliganoj kaj biletojn por la koncernaj piedpilk-ludoj en Francio. Ses tiaj rusoj povis esti arestitaj, dum aliaj povis fuĝi. Post tio la rusaj piedpilk-barbaroj malaperis el Eŭropo.

Por eviti la impreson, ke mi prisilentas ion ajn, mi volas aldoni, ke ankaŭ kvindekda germanaj huliganoj atakis en Lilo grupon de uk-rainaj fanoj, post kiam ili kriis ekstremdekstrajn sloganojn kaj montris militan flagon de la germana regno. UEFA preferis lasi la kaŭzintojn de tiuj agadoj nepunitaj, kvankam en alia kazo ankaŭ la kroatoj ricevis drastan monpunon pro tio, ke iliaj fanoj jetis eksplodaĵojn sur la piedpilkan kampon de la staciono, tiel ke la koncerna matĉo devis esti interrompita. Kiam tiuj piedpilkteamoj estis venkitaj kaj ekŝiĝis el la turniro, la piedpilkfestoj fariĝis finfine pli trankvilaj, pli paca kaj pli civilizita.

## **Strangaj oficialaj reagoj el Anglio kaj Rusio**

Dum la brita gazetaro kritikis unuavice la organizantojn de la turniro kaj la francajn aŭtoritatojn, la rusia flanko reagis per averto al la propraj homoj: La rusia gazetaro, ekzemple *Sport-Ekspress*, mallaŭdis la perfortajn huli-ganojn, sed riproĉis ankaŭ la rusiajn piedpilk-estojn. Estis anoncote, ke la kulpantoj devos transpreni la respondecon por la „interbatado, pireteknikaĵoj kaj flagoj kun la kelta kruco en Marsejlo“, dum la respondecon por la tumulto en la stadiono mem devas transpreni la rusia piedpilkasocio.

*Vitalij Mutko*, la rusia sportministro kaj intima amiko de Putin kaj Medvedev, kiu samtempe estas altranga FIFA-funkciulo kaj persone ĉeestis la koncernan matĉon, kritikaĉis la „mankantan sekurecon“ en la stadiono, ekzemple la mankon de muro inter angla kaj rusa fanblokoj. Sed li promesis, ke la skandalo estos esplorata.

27-jara rusa fanino, kiu ĉeestis la matĉon kun sia patro, estis citita de *Guardian* per la vortoj, ke ŝi hontas pro la konduto de kelkaj kuncivitanoj, pardonpetis ĉe la vunditaj angloj kaj alvokis, ke oni ne kredu, ke ĉiuj rusoj estas kiel tiuj huliganoj. Bedaŭrinde, kiel fano oni povus fari nenion kontraŭ la misformoj en tiu huligana subkulturo, kiu ekzistas en Ruslando.

Sed ne ĉiuj rusoj estis hontemaj. Male, al iuj altrangaj moskvaj politikistoj ŝajne eĉ plaĉis la batalemaj rusaj fanoj, kiuj „defendis la honoron de Ruslando“. *Igor Lebedev*, membro de la partio de la bizara ultranaciisma politika klaŭno Vladimir Ĵirinovskij, kies filo li cetere estas, eĉ plu instigis la rusajn fanojn: „Nenion malbonan mi povas vidi en batalantaj fanoj“, li estis citita de la gazetaro, „male, la rusaj fanoj bone batalas – daŭrigu tiel!“ La rusajn fanojn li senkulpigis per la argumento, ke la polico devus pli bone protekti la sporteventon. Do, aliaj kulpis pri la eksplodo de rusa perforto en Francio. Eble oni povus komplete ignori tiun homon, se li ne estus altrangulo en la rusa piedpilkasocio kaj vicprezidanto de la ruslanda Dumao (parlamento). Eĉ Anna Rose, korespondantino de *Rossijskaja gazeta* en Germanio, kiu opinias, ke la anglaj huliganoj ne estas „pli bonaj“ ol la rusaj, trovis la sintenon de Lebedev „hontinda“.

Eĉ pli radikalan formulon trovis la rusa publicisto *Maksim Kononenko*, kiu komunikis, ke li ŝatas „rusajn batalantojn, kiuj detruas la makzelon de nerusaj tipoj“. Li ne montris komprenon por tio, kial en Ruslando oni kondamnu la rusajn huliganojn, kiuj laŭ li prezentas sin kiel specon de avangardo en la kulturbatalo kun Eŭropo. Li ankaŭ ne vidis kaŭzon por pardonpeti ĉe „tiu Eŭropo“, kiu „rostu en la infero“.

Kiel dirite, oni povus ignori ĉiujn tiujn dubindajn rusajn „intelektulojn“, kiuj eldiras unu sovaĝan provokaĵon post la alia, sed oni devas observi ilin kun atento, ĉar ili disponas nemezureblan influon en la putinisma Ruslando, kie grandparto de la popolo ŝajne estas infektita de kontraŭ-eŭropaj kaj ekscitita de kontraŭ-okcidentaj emocioj, kiuj videble estas tolerataj kaj instigataj de la ŝtato.

Oficiale, la rusia registaro ja kondamnis la perforton de la rusaj huliganoj kiel ion „absolute neakcepteblan“ (Lavrov), kaj eĉ Putin nomis ĝin „kompleta malordo“ (bezobrazie polnoe). Kvankam *RIA Novosti* esprimis „kontenton, ke rusaj huliganoj batalas kontraŭ anglaj fanoj“, *Dmitrij Peskov*, gazetara parolisto de Putin, tamen emfazis, ke la opinio de Lebedev ne reprezentas la oficialan vidpunkton de la Kremlo. Kvankam Putin ŝovis la kulpon pri la skandalo al la francoj, li volas „lerni el tiuj spertoj por la Turniro de la Ĉampioneco okazonta post du jaroj en Ruslando“. En sia kutima sarkasma maniero Putin komentaĉis, akompanate de la ridado de la amuzata publiko, kiu ĉeestis la Ekonomian Forumon, kiu okazis en tiu tempo en Peterburgo, ke li tamen ne komprenas „kiel eblas, ke niaj du cent fanoj sukcesis batali kontraŭ du mil angloj“. Tiuj vortoj ŝajne baziĝis je la komento de iu rusa huligano, kiu diris al la franca novaĵagentejo AFP en intervjuo, ke „120 rusoj forpelis 2000 anglojn“. Samtempe, Putin avertis, ke oni ne devus supertaksi la perforton de la rusaj huliganoj. Tio postlasis la impreson, kvazaŭ la rusa ŝtatestro, kiu en sia junaĝo mem estis malgranda huligano, kaj lia bando, kiuj gvidas la ŝtaton, celus bagateligi la incidenton kaj protekti la perfortajn piedpilk-fanojn de Ruslando, kiujn oni povas konsideri integra parto de la „sistemo de Putin“.

## Malvenko de la rusoj

Ĉiukaze, por Ruslando la historio de la partopreno en la Eŭropa Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco en Francio de la jaro 2016 finiĝis malbone. Post kiam la ukraina piedpilkteamo malvenkis kontraŭ Pollando, kio ankoraŭ kaŭzis en Ruslando ondon de malica ĝojo kaj ironiaj komentoj pri la malsukcesaj ukrainoj, la 20an de junio sekvis la sama peripetio por la rusa teamo mem, kiu estis venkita de malgranda Kimrio per 0:3. La ruslanda futbalo troviĝis frakasita sur la tero de la stadiono de Tuluzo kaj estas renovigota du jarojn antaŭ la *monda* Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco, kiu devos okazi en Ruslando en 2018 (intertempe estis komunikite, ke la nacia rusia piedpilkkomando estas dissolvita). Trejnisto Sluckij preferis demisii de sia posteno, post kiam lia teamo estis akceptita de la hejma publiko kun plena ĉagreno pro la kaŭzita fiasko, kiu estis perceptata kiel honto por humiligita nacio. Al la anoj de la rusia nacia piedpilkteamo oni rekomendis pli ofte trejni sin en eksterlandaj kluboj por altigi la nivelon.

La plej galan komenton elpuŝis la moskva verkisto *Sergej Minaev*: „Antaŭ la komenco de la Eŭropa Turniro de la Piedpilka Ĉampioneco ĉiuj parolis pri tio, en kiuj stadiono la piedpilkteamoj de Ruslando kaj Ukrainio renkontiĝos dum la ludoj. Nun ili renkontiĝas en la flughaveno.“ Atendante por flugi hejmen.

Kiel bizara rezulto de la malĝojiga sportekzerco en Francio de somero 2016, kiu estis ege kritikata kaj mallaŭdata de la internacia gazetaro, malgranda Portugalio neatendite kaj unuafoje en la historio venkis grandan Francion, kiu devintus gajni la konkurson, pri kio eĉ la rusia gazetaro miregis. Bona afero por Portugalio!

Post la spertoj kolektitaj ĉijare kaj pro aliaj kialoj ŝajnas, ke la antaŭĝojo estas malgranda kaj la timoj grandaj, ke la venonta *monda* piedpilktturniro okazos post du jaroj en Ruslando. Imageble Putin zorgos pri bona ordo, huliganaj tumultoj ne okazos, anglaj kaj rusaj fanoj ne kunpuŝiĝos.

Andreas Künzli, julio 2016

Utiligitaj fontoj:

Svisaj (germanlingvaj):

<http://www.tagesanzeiger.ch/em2016/news/durchtrainiert-nuechtern-und-zu-allem-bereit/story/30102803>

<http://www.tagesanzeiger.ch/em%202016/news/Lob-fuer-russische-Hooligans-aus-der-Heimat/story/18851386>

<http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/russen-feiern-den-11-juni-2016-als-hervorragenden-tag/story/13252351>

<http://www.tagesanzeiger.ch/em%202016/news/Frankreich-weist-russischen-FanAnfuehrer-aus/story/16642693>

<http://www.derbund.ch/em2016/viele-von-uns-waren-in-polizei-und-armee/story/12625434>

<http://bazonline.ch/em2016/Uefa-verwarnt-Russland-und-England/story/20286746>

<http://bazonline.ch/wetter/allgemeinelage/der-beruechtigte-sportminister/story/11145440>

<http://www.nzz.ch/russische-hooligans-uefa-fordert-auch-sich-selbst-ld.88939>

<http://www.aargauerzeitung.ch/sport/fussball/moskau-spornt-hooligans-an-die-russischen-fans-schlagen-sich-gut-130348217>

<http://www.blick.ch/news/ausland/russland-experte-zu-hooligan-krawallen-putin-will-dem-westen-die-feier-vermiesen-id5156634.html>

<http://www.srf.ch/play/tv/10vor10/video/hooligans-gekommen-um-zu-pruegeln?id=83c1fa22-0e6b-4ecb-b1dd-d5fa9d133d29>

<http://tp.srgssr.ch/p/portal?urn=urn:srf:ais:video:18b6cd2f-94c3-4777-920c-40144534f547&autoplay=true&legacy=true&width=640&height=360&playerType=>

Germanaj (germanlingvaj):

<http://www.spiegel.de/sport/fussball/randale-beim-em-spiel-england-russland-kollektiv-versagt-a-1097143.html>

<http://www.spiegel.de/sport/fussball/marseille-russische-hooligans-sollen-sehr-gut-vorbereitet-gewesen-sein-a-1097319.html>

<http://www.spiegel.de/sport/fussball/em-2016-polizei-in-frankreich-stoppt-russische-hooligans-a-1097510.html>

<http://www.spiegel.de/politik/ausland/em-2016-russland-zu-hooligan-krawallen-europa-soll-in-der-hoelle-schmoren-a-1097995.html>

<http://www.spiegel.de/sport/fussball/em-2016-wales-sichert-sich-gruppensieg-sieg-gegen-russland-a-1098743.html>

<http://www.spiegel.de/sport/fussball/russland-zum-euro-2016-aus-ein-torwart-und-zehn-schildkroeten-a-1098820.html>

<http://www.spiegel.de/sport/fussball/em-2016-russische-hooligans-mit-besten-kontakten-zur-politik-a-1097601.html>

<http://www.faz.net/aktuell/nach-der-attacke-auf-spanische-touristen-sitzen-fuenf-russische-hooligans-in-haft-14294672.html>

<http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/kreml-lobt-gewaltexzesse-russischer-hooligans-14293703.html>

<http://www.zeit.de/sport/2016-06/fussball-em-russische-hooligans-randalieren-in-koeln>

<http://www.zeit.de/sport/2016-06/krawalle-marseille-em-russische-hooligans>

<http://www.zeit.de/sport/2016-06/fussball-em-marseille-nizza-randale-gewalt-verletzte-uefa>

<http://www.sueddeutsche.de/politik/fussball-em-russland-bestellt-franzoesischen-botschafter-wegen-fan-festnahmen-ein-1.3035027>

<http://www.welt.de/sport/fussball/em-2016/article156156131/EM-Organisatoren-haben-die-Hooligan-Gefahr-unterschaetzt.html>

<http://www.welt.de/politik/ausland/article156326507/Putin-sieht-Rolle-russischer-Hooligans-ueberbewertet.html>

<http://www.welt.de/politik/ausland/article155166048/Putins-Rocker-in-Berlin-angekommen.html>

[http://www.focus.de/sport/fussball/em-2016/em-2016-im-news-ticker-turnierausschluss-auf-bewahrung-fuer-russland-hohe-geldstrafe\\_id\\_5632825.html](http://www.focus.de/sport/fussball/em-2016/em-2016-im-news-ticker-turnierausschluss-auf-bewahrung-fuer-russland-hohe-geldstrafe_id_5632825.html)

<http://www.sportschau.de/uefaeuro2016/em-russland-trainer-ruecktritt-sluzki100.html>

<http://www.dw.com/de/russische-hooligans-pr%C3%BCgeln-f%C3%BCrs-vaterland/a-19328655>

[http://www1.wdr.de/daserste/presseclub/sendungen/russland\\_sport100.html](http://www1.wdr.de/daserste/presseclub/sendungen/russland_sport100.html)

<http://www.ardmediathek.de/tv/Reportage-Dokumentation/Spiel-im-Schatten-Putins-unerklarter-K/Das-Erste/Video?bcastId=799280&documentId=36370938>

<http://www.watson.ch/EM%202016/Fussball/453234174-Wie-eine-russische-Troll-Fabrik-mit-Fake-Accounts-die-Hooligans-anheizt-%E2%80%93-und-mein-Profilbild-klaut>

Britaj (anglalingvaj)

<https://www.theguardian.com/football/2016/jun/12/russian-hooligans-savage-organised-england-fans-marseille-euro-2016>

<http://www.abc.net.au/news/2016-06-12/russias-racist-and-violent-football-hooligans/7503298>

Ruslandaj (ruslingvaj):

<http://www.kompravda.eu/daily/26541.7/3557916>

<http://www.novayagazeta.ru/columns/73444.html>

<https://lenta.ru/articles/2016/06/14/soldiers/>

<https://lenta.ru/news/2016/06/17/putinfanseuro>

<https://lenta.ru/news/2016/06/13/reutersstaff>

<http://www.segodnya.ua/world/vice-spiker-gosdumy-pohvalil-rossijskih-fanatov-ustroivshih-krovavyy-bespredel-v-marsele-724319.html>

<http://avtoinsider.com/ne-vizhu-nichego-chudovischnogo-v-potasovke-fanатов-igor>

[http://www.rusdialog.ru/news/69396\\_14oeln65820503](http://www.rusdialog.ru/news/69396_14oeln65820503)

[http://www.gazeta.ru/sport/news/2016/07/17/n\\_8891471.shtml](http://www.gazeta.ru/sport/news/2016/07/17/n_8891471.shtml)

Ukrainaj (ruslingvaj):

<http://football.sport.ua/news/307842>

Aliaj:

<http://kurier.at/sport/fussball-em/pressestimmen-nach-portugal-frankreich-das-war-der-schlechteste-grosse-wettbewerb-aller-zeiten/209.150.253>

[https://de.wikipedia.org/wiki/Igor\\_Wladimirowitsch\\_Lebedew](https://de.wikipedia.org/wiki/Igor_Wladimirowitsch_Lebedew)

<https://de.wikipedia.org/wiki/Teleskopschlagstock>

Общероссийское общественное движение «Всероссийское объединение болельщиков» (Wikipedia)

Legindas la plej nova libro de Boris Reitschuster: Putins verdeckter Krieg. Econ 2016. 336 p.

<http://www.osteuropa.ch>